

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por 1/2 jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rĉusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/2 de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 7.

Nurnbergo, Julio 1891.

Jaro II.

La numeroj 8 kaj 9 (Aŭgusta kaj Septembra) de nia gazeto eliros ambaŭ kune en la mezo de Septembro. — Pri la projekto de la Esperantistoj-vastigantoj ni ricevis ĝis nun la opinion nur de tre malmultaj amikoj; tial ni lasas ankoraŭ la solvon de tiu ĉi demando ĝis Septembro.

La redakcio.

Ŝanĝotaĵo.

(Daŭrigo.)

1. Pli malpli 5—6 monatojn post la apero de la unua lernolibro de nia lingvo ni ricevis de unu sinjoro leteron, en kiu li skribis, ke nia lingvo estas tre bona, bonega, sed nur la vorto „kaj“ forte malplaĉas al li, tiel malplaĉas, ke li sendis al ni promeson, ke li ellernos nian lingvon kun la kondiĉo, ke ni elĵetu la vorton „kaj“! Kaj tiu ĉi sinjoro tute ne estas humoristo, li skribis tute serioze! Ĉu la vorto „kaj“ estas bona aŭ malbona, — tiu ĉi ekzemplo (kiu ne estas la sola en sia maniero) montras, ke kelkaj tute ne komprenas la karakteron de nia afero kaj rigardas ĝin de punkto de vidado pure persona. Anstataŭ analizi, ĉu la proponita sensignifa reformeto estas efektive necesa por la afero mem, la dirita sinjoro diris, ke li persone ne ellernos la lingvon, se la vorto „kaj“ ne estos ŝanĝita! Se ni eĉ supozus, ke la vorto „kaj“ per si mem estas tre facile ŝanĝebla, — ĉu povas iam ekzisti lingvo tutmonda, se ĉiu lernanto volos, ke oni ĉion ŝanĝu en ĝi laŭ lia persona plaĉo? Se ni volas havi lingvon tutmondan, ni devas antaŭ ĉio kutimi meti niajn personajn gustojn sur la lastan planon. Nun ni supozu, ke la reformo de „kaj“ havas efektive gravan celon ne personan, sed komunan, kaj ni rigardu, kion oni povas fari kun tiu ĉi vorto. Je kio propre la vorto „kaj“ estas kulpigata? ĉu ĝi estas malbonsona? tro longa? ne preciza? elvokanta konfuzon kun aliaj vortoj? Ni forte dubas, ĉu iu respondos tiujn ĉi demandojn alie, ol per absoluta „ne“! Kio do? La proponinto diras, ke anstataŭ la „arbitre elpensita „kaj“ devus esti prenita la ĉiukonata „et“ aŭ „e“. Ne irante ankoraŭ pli malproksime, ni jam povus respondi, ke tiu ĉi bagatelo povus servi kiel motivo tiam, se ni havus ankoraŭ tute liberan elekton inter „kaj“ kaj „e, et“, sed fari pro tia bagatela motivo rompon en la lingvo tute ne estas inde. Sed se ni iros pli malproksime, ni vidos, ke eĉ tiam, kiam la vorto ne estis ankoraŭ kreita, estus granda demando, ĉu „et, e“ estas pli bona ol „kaj“. La vorto „kaj“ ne sole ne estas maloportuna, sed ĝi ankaŭ tute ne estas arbitre elpensita (ĝi estas vorto greka = la latina „et“). Sekve la motivoj

kontraŭ „kaj“ estas tiel bagatelaj, ke eĉ en la tempo de la kreado ni devus preni „et, e“ anstataŭ „kaj“ nur tiam, se la uzebleco de ambaŭ formoj estus egala; sed ilia uzebleco ne estis egala: dum la vorto „kaj“ estas tute libera, la vortoj „e“ kaj „et“ estis necesaj por la finiĝo de l'adverbo kaj por la sufikso de malgrandeco, por kiuj ni ne povis doni aliajn vortojn (uzi tiun saman formon por finiĝo gramatika aŭ sufikso kaj por sendependa vorto ni ne povis, ĉar laŭ la konstruo de nia lingvo [pro la senlerna uzebleco de la vortaro] la finiĝoj kaj sufiksoj estas sendependaj vortoj). Se ni volus doni „e“ aŭ „et“ por „kaj“ ni devus doni ian sovaĝan formon al la tuta kategorio de la adverboj aŭ la tuta kategorio de la vortoj etaj; inter tuta kategorio da vortoj kaj unu simpla vorteto ni elektis la unuan, kaj tial la ofero devis fali sur la flanko de la lasta. La neprenado de „e“, „et“, „i“ kaj tiel plu estis sekve de nia flanko ne simpla „netrovo de la bono“, sed intenca faro. Ĉu ni estis pravaj aŭ ne — ne estas nun tempo priparoli; sed se jam tiam la forĵeto de „e“, „et“ k. t. p. estis ne tute sen motivoj, tiom pli ne ekzistas kaŭzo por nun enkonduki ĝin per oferoj de rompado. Tuŝante la novajn vortojn en la Plena vortaro, reformoj en apartaj vortoj povas esti farataj sen granda malutilo; sed en la vortoj de la fundamenta vortareto kaj precipe en tiaj vortoj kiel „kaj“, kiuj estas tro konataj kaj uzataj sur ĉiu paŝo de la unua tago de ekzistado de nia lingvo, reformoj sen gravaj motivoj ne devas esti farataj. Pri la sensignifa vorteto „kaj“ ni parolis tiel vaste ne por solvi la demandon pri la vorteto mem, sed nur ĉar ĝi donis al ni la okazon turni la atenton de niaj amikoj sur la manieron, en kiu la dirita reformo estis al ni proponita; kaj ni ripetas nian opinion, ke la obeado al la personaj gustoj en tiel komuna afero, kiel la nia, estas tre malutila. Se ni tiel energie batalas kontraŭ ĉia sennecesa reformo, ni faras ĝin ne el amo al niaj propraj formoj aŭ el malamo al fremdaj opinioj, kiel kelkaj eble pensas, sed el amo kaj zorgo por nia afero mem, kiu kompreneble baldaŭ tute detruigus, se ĉiu aparte volus ĝin el pura persona opiniamo ŝiri laŭ sia plaĉo kaj sen grava neceso montri sur ĝi siajn talentojn.

2. Tiel same malmulte, kiel per gustoj personaj, ni devas nin ankaŭ gvidi en niaj proponoj per gustoj naciaj, se la proponoj havas nenian alian celon ol nur flati nelerte tiun aŭ alian nacion, alportante per tio ĉi nenian utilon al la nacio kvazaŭ flatata kaj grandan malutilon al la afero mem. Tiel ekzemple unu sinjoro, kiu nun apartenas al la plej varmaj amikoj de nia lingvo, en la komenco estis forte kolera kontraŭ ĝi el la kaŭzo, ke ĝi „ne estas sufiĉe inter-

nacia", ĉar enhavas preskaŭ nenan vorton rusan. Multe ni jam devis suferi de tiu malvasta pseŭdo-patriotismo, kun kiu diversaj personoj renkontis nian aferon, kies devizo estas „frateco de la popoloj“. Dum unuj malamike renkontis nian aferon el la kaŭzo, ke nia unua debuto, la unua lernolibro de nia lingvo, eliris en lingvo rusa, — la supre dirita sinjoro en la unua tempo trovis, ke nia afero estas „malamika al la rusa popolo, ĉar . . . Volapük havas la rusan vorton „ibo“, dum ni donis por ĝi la ŝanĝitan francan vorton „ĉar“! — Unu redaktoro de sveda gazeto trovis, ke nia lingvo havas karakteron tro italan. Kiam ni ne povis akcepti lian proponon kaj sen ia celo „malitaligi“ nian lingvon, la proponinto ne longe atendis kaj provis fari mem lingvan miksaĵon, kiu laŭ lia opinio devus pli plaĉi al la nordaj popoloj. Ni ne bezonas rakonti, kio fariĝis el nia afero, se ĉiu popolo volus el simpla vanteo doni al ĝi sian propran karakteron. Nia afero fariĝis absolute neebla. Kaj se ĝi eĉ estus ebla, — ĉu la flatita popolo mem ion gajnus de tio? La dirita sveda sinjoro, kiu en la komenco diris, ke liaj ŝanĝoj estas necesaj, kaj faris provojn en la daŭro de kelka tempo, nun vidas jam, al kio ĝi lin kondukis: la lingvo fariĝis malbonsona kaj malregula, kaj el la svedoj mem, por kies nacia flato li volis pereigi nian aferon, neniu akceptis liajn ŝanĝojn, dum nia lingvo en ĝia nuna formo, kiu estas tiej „malsveda“, havas multajn amikojn inter la svedoj kaj estas al ili multe pli oportuna kaj pli hejma, ol la svedigita, kiu mortis, antaŭ ol ĝi akceptis ian difinitan formon. — Unu el niaj slavaj amikoj trovis, ke la lingvo internacia devas havi tiom same da slavaj vortoj, kiel da romana-germanaj. Li ankaŭ volis krei novan lingvon, kiu enhavus en si multajn vortojn slavajn; sed baldaŭ li konvinkigis, ke ne sole al aliaj popoloj, sed al la slavoj mem multe pli oportunaj kaj agrablaj estas niaj vortoj romana-germanaj, ol la vortoj slavaj, kiuj, enmetite en sistemon romana-germanan, tranĉas la orelon kaj fariĝas al la slavoj mem multe malpli kompreneblaj, ol la vortoj ne slavaj. (Se ni bone memoras, la vorto „internacia“ tie estis tradukata „mejufoka“; sed ni petas, ke iu slavo diru al ni, kion li pli bone komprenas kaj memoros, la vorton „internacia“ aŭ „mejufoka“? Ili estos preta serĉi la vorton en ia ĥina vortaro; kaj al li eĉ ne venos en la kapon, ke la vorto estas kunmetita el lia propra slava „meĵdu“ kaj la germana „Volk“, perdinte la „d“ kaj la „l“, ĉar ankaŭ 2 konsonantoj ne devas stari kune!). Se la amiko, egale al la aliaj, farus sian proponon nur teorie, li eble eĉ nun restus ĉe sia opinio kaj eble kolerus nin, ke ni estas tiel obstinaj kaj ne volas enkonduki tiun ĉi „necesan“ ŝanĝon; sed feliĉe li faris provon praktikan, kaj la praktiko lin la plej bone konvinkis, kaj nun li denove fariĝis tre varma amiko de nia lingvo en ĝia nuna formo. — El la diritaĵo ni povas eltiri la sekvantan regulon: se ni volas proponi aŭ fari ian ŝanĝon, ni devas nin demandi, kian utilon la ŝanĝo alportus al la lingvo mem, kaj ĉu la utilo de la ŝanĝo kovrus la malutilon; sed ni neniam devas obei la senfondajn gustojn kaj la simplan vantecon de ia aparta nacio, ĉar tiam ni malutilon alportus al nia afero grandan, kaj utilon ni alportus al neniun nenan. En ĉiuj okazoj, kiuj ne estas absolute gravaj per sia enhavo mem, vantaj senkaŭzaj gustoj naciaj devas en afero internacia tiel same absolute silenti, kiel la gustoj personaj; se ni ne volas el persona aŭ nacia disputemeco pereigi nian aferon; tiuj ĉi gustoj devis silenti jam en la tempo de la kreado de l' lingvo, kaj tiom pli ili sendube devas silenti, se ilia obeado postulas rompordon en nia lingvo.

3. Egale kiel la sekvado de gustoj personaj aŭ naciaj, estas senfrukta kaj danĝera ankaŭ la sekvado de teoriaj principoj, se ni ne demandas nin, kian praktikan signifon ili havas. La defendantoj de tiaj teoriaj principoj ofte memo-

rigas la instruitulon, kiu, vidante ke el la tuta bestaro nenia speco da bestoj manĝas bakitan panon, venis al la logika konvinko, ke ĝi ne estas sana kaj bongusta, kaj komencis sin nutradi je kampaj herboj kaj kruda viando. Teoriaj proponoj, ofte eksterordinare strangaj kaj havantaj nenan eĉ plej malgrandan praktikan fundamenton, estis faritaj al ni en granda amaso. Sed ne parolante pri ĉiuj el ili, ni prenos por ekzemplo nur unu, kiu apartenas ŝajne al la plej bonaj kaj pravaj kaj trovis multajn aprobantojn. Ni parolas pri la regulo de la akcento. Sinjoro de Wahl en tre bona artikolo montris, ke la ŝanĝoj, kiujn diversaj vortoj ricevis, transirante el unu lingvo en alian, neniam tuŝas la akcenton, ke volonte estas forglutataj tutaj silaboj, por nur ne ŝanĝi la akcenton, ke sekve la akcento en diversaj niaj vortoj, kiel ekzemple „nacio“, „titolo“ k. c. estas kontraŭnatura; kaj sinjoro Runstedt eĉ rakontas pri unu persono, kiujn la akcentoj en „animio“, „proksime“ k. c. fortimigis de nia lingvo, kvankam per si mem la lingvo al li tre plaĉis. Kiel ajn bela tiu ĉi opinio ŝajnas en la teorio, ĝi tamen post pli atenta pripenso baldaŭ montriĝas al ĉi kiel bela . . . sofismo. Ni rigardu atente, en kio propre kuŝas la kulpo de la konstanta akcento, kaj kia grava kaŭzo devigas nin aŭ doni malfacilan kaj konfuzan malregulecon al la akcento, aŭ forigi silabojn en diversaj vortoj, por ke la akcento fariĝu „pli natura“. Ĉu vortoj kiel ekzemple „proksima“, „titolo“ estas pli malfacile ellerneblaj kaj memoreblaj, ol „titolo“, „proksima“? Ne, neniu dubos, ke ellerni unu akcenton por ĉiuj vortoj estas mil fojojn pli facile, ol memori por ĉiu vorto apartan akcenton. (Demandu la alinaciulojn, kiuj lernas la lingvon rusan, kaj ili diros al Vi, kiom da grandegaj malfacilaĵoj prezentas al ili la ellernado kaj regula uzado de la rusa akcento!). Ĉu la diritaj vortoj estas malfacile elparoleblaj? ĉu ili estas malbonsonaj? ĉu ili prezentus eble ian alian maloportunaĵon? Ne! sendube ne! ĉiu scias, ke la akcento sur la antaŭlasta silabo estas ĉiam la plej bone elparolebla kaj la plej bonsona. Dum la malreguligo de la akcento estus ligita kun tro grandaj kaj tro videblaj maloportunaĵoj, Vi en nia nuna konstanta akcento ne trovos eĉ la plej malgrandan maloportunaĵon, se Vi eĉ serĉos tutan vivon! Kial do, oni povas demandi, propono tiel senfundamenta povis plaĉi al kelkaj el niaj amikoj? La respondo estas tre simpla: la propono tuŝis kordon konatan de ni ĉiuj sed de ni mem ĝis hodiaŭ ne rimarkitan; kaj se homo ekaŭdas ion konatan, li ofte kontraŭvole, sen konscio kaj sen analizo, ekkrias: „jes, jes, bone!“

Ni analizu pli proksime la motivojn, kiuj ŝajnigis parolas pro la propono. La konato de sinjoro R. ne volis lerni nian lingvon, ĉar kutiminte je la elparolado de la latina „proximus“, „animus“, li ne povis akcepti la vortojn „proksima“, „animio“. Sed ne malfacile estas vidi la tutan sensignifecon de tiu ĉi motivo. Ĉu la latina vorto „maximus“ estas motivo kontraŭ la franca vorto „maxime“? ĉu la simpla fakto, ke ia vorto havas ian difinitan formon en unu lingvo, prezentas ian eĉ plej malgrandan kaŭzon, por ke tiu ĉi vorto en alia lingvo ne havu alian formon? Se hodiaŭ iu postulas, ke anstataŭ „facila“ ni diru „fácil“, li morgaŭ kun tia sama rajto postulos, ke anstataŭ „fácil“ ni diru facilis, ĉar la formo „facila“ al lia orelo estas fremda! Kaj kun tia sama rajto oni postmorgaŭ postulos, ke ni al ĉiuj vortoj en nia lingvo donu tiujn formojn, kiujn oni trovas en la lingvo ekzemple latina, t. e. ke ni tute detruu la lingvon internacian kaj anstataŭigu ĝin per ia alia jam ekzistanta lingvo, ĉar . . . (nenia alia kaŭzo) . . . ĉar la formoj de tiu aŭ alia lingvo al sinjoro X aŭ Y estas konataj kaj la formoj de nia lingvo al li ne estas ankoraŭ konataj! Ĉiu lingvo havas siajn leĝojn, kaj se la leĝoj per si mem estas bonaj, estus ridinde deziri ilin ŝanĝi nur tial, ke alia lingvo havas aliajn leĝojn. Ĉu ni povas diri, ke la germana vorto „Geographie“ estas malbona kaj tranĉas la orelon,

ĉar la rusoj elparolas tiun ĉi saman vorton „geografía“? Al la konato de sinjoro R. la vorto „proksima“ en la unua momento malplaĉis, ĉar li alvenis al tiun ĉi saman vorton nia lingvo kun kutimoj latinaj; ĉio dependas de la kutimo, kaj nun, kiam ni kutimis je la leĝoj de nia lingvo, ni povas certigi, ke se iu antaŭ ni elparolas la nomon de nia lingvo „internacia“ anstataŭ „internacia“, ĝi tranĉas nian oreilon tiel ture, kiel se iu tirus karbon sur vitro.

La kutimo ofte ludas gravan rolon en la vivo; eble ni devas kalkuli kun ĝi? Se ni povus ĝin fari sen ia malutilo — jes, kial do ne kalkuli? Sed se por parton da homoj liberigi de alkutimiĝo je unu tre facila regulo („akcento ĉiam sur la antaŭlasta silabo“) ni bezonus multepli grandan parton da aliaj homoj devigi lerni kaj memori multajn regulojn (sen ia regulo memori apartan akcenton por ĉiu aparta vorto), — kion ni tiam devas preferi? Ni forte dubas, ĉu troviĝos iu, kiu konsilus solvi la demandon alie ol ni ĝin solvis! Por ne devigi la lernantojn memori apartajn akcentojn por ĉiu vorto, oni eble konsilos al ni transformi grandan parton da vortoj en nia lingvo tiel, ke ili konsentigu en si la regulon pri la akcento konstanta kun la akcento kutima (ekzemple „titlo“ anstataŭ „titolo“, „amo“ aŭ „ano“ anstataŭ „animo“, „proksa“ aŭ „proma“ aŭ „propa“ anstataŭ „proksima“ k. c.); sed ne parolante jam pri la malbonsoneco, malklaraĵoj k. t. p., kiuj tiam naskiĝus, kaj supozante, ke eĉ la lingvo mem nenion de tio suferus, ni forte dubas, ĉu iu serioze lasus enkonduki tian grandan rompdon en nia afero . . . sen ia eĉ la plej malgranda kaŭzo! Sen ia eĉ la plej malgranda kaŭzo: ĉar ni serĉis kaj serĉis kaj ne povis trovi en la konstanta antaŭlasta akcento nenian eĉ la plej malgrandan maloportunecon nek por la memoro, nek por ja buŝo, nek por la orelo. Kontraŭ nia regulo ekzistas absolute nenio, ekster la tute sensignifa motivo, ke la lingvo X aŭ la lingvo Y tion ĉi ne havas.

Sed eble kontraŭ nia regulo ekzistas io tio, kion oni per vortoj esprimi ne povas, sed kion oni neklare sentas, kiel ian vokon de naturo? Ni aŭskultu, kion diras sinjoro de W: li ne vidas kaj ne montras ian faktan cirkonstancan kontraŭ la akcento en nia lingvo; sed rimarkinte, ke la naturaj lingvoj oferas la sonon kaj formon de la vortoj, por nur konservi la unuatempan akcenton, li vidas en tio ĉi naturan leĝon kaj konsilas al ni sekvi tiun ĉi leĝon, por ke nia lingvo ne estu kontraŭnatura. Je l' unua rigardo povas efektive ŝajni, ke ni pekas kontraŭ la natura leĝo; sed ni rigardu pli atente, en kio konsistas tiu ĉi „leĝo“, kaj kia puno atendas la rompanton de ĝi. Malsupre ni montrus, ke tio, kion oni prenis por natura leĝo de ĉiuj lingvoj, estas nur okaza apartenaĵo de kelkaj lingvoj; sed ni supozu por momento, ke tio ĉi efektive estas leĝo, kiu ekzistas en ĉiuj lingvoj; kio do sekvas de ĝi? Se ia regulo efektive ekzistas en ĉiuj lingvoj kaj ni ne komprenas la kaŭzon kaj la celon de tiu ĉi regulo, kio do devigas nin ankaŭ blinde akcepti tiun ĉi regulon, se ĝi estas por ni maloportuna? Ĉiuj riveroj en la mondo havas fluon tre kurban kaj tre neregulan; sed se iu, kun instrumentoj en la mano arte fosante kanalon, volus sekvi tiun ĉi „leĝon naturan“, — ĉu Vi laŭdus lin, aŭ ĉu Vi eĉ iom povus lin pravigi? Ĉiuj lingvoj naturaj havas grandan amason da malregulaĵoj kaj malfacilaĵoj, — ĉu ni ankaŭ devas sekvi tiun ĉi „leĝon naturan“ kaj intence fari nian lingvon malregula kaj malfacila?

Eĉ se ni tute ne scius la esencon de la akcento, eĉ tiam estus la plej nature, se anstataŭ tro filozofie fosi en teorioj ni dirus al ni praktike: la ceteraj lingvoj havas akcenton malregulan kaj malfacilan, kiun ili jam ŝanĝi ne povas; ni havas ankoraŭ liberan elekton kaj povas sen la plej malgranda malutilo havi akcenton facilan kaj regulan; sekve ni devas elekti la lastan, tute ne rompante al ni la kapon, pro

kia kaŭzo la lingvoj kreitaj blinde tiun ĉi oportunajon ne havas; ĉar estus ridinde imiti kun malutilo al ni mem iajn misteraĵojn, se ni ne komprenas ilian sencan kaj celon. Sed se ni rigardos pli profunde, ni baldaŭ vidos, ke la „leĝo de la akcento“ eĉ ne estas ia misteraĵo, kaj tio, en kio ni serĉis ian leĝon naturan, estas simpla okazaĵo, kiu kun la esenco kaj spirito de la lingvoj havas nenion komunan. La lingvo de ĉiu nacio kreiĝis tiam, kiam la nacio ne sciis ankoraŭ skribi kaj la lingvo transiradis de unu homo al alia nur per la orelo; la orelo de Johano aŭ Petro ofte ne bone aŭdadis, la memoro senkontrolo ne bone tenadis, kaj tiel la vortoj renversigadis kaj akceptadis diversajn sovaĝajn formojn; kontroli la vortojn per skribado oni ne povis, kaj tial la plej puraj kaj sensanĝaj restis nur tiuj silaboj, kiujn oni bone aŭdis, t. e. la silaboj akcentitaj. Jen estas la tuta mistera kaŭzo, kial la silaboj akcentitaj ofte restadis sensanĝaj, dum la tuta cetera parto de l' vorto ŝanĝigadis — el simpla senhelpa neceseco kaj ne el ia lingva leĝeco. De la momento, kiam ia popolo ricevas skriban literaturon, ni jam tian blindan lingvan akrobataĵon ne renkontas. Sed se ni, havantaj literaturon skriban pli frue ol literaturon buŝan kaj orelan, sciantaj skribi kaj legi kaj povantaj gardi la lingvon de blinda malbonorela renversigado, volus intence fari la erarojn, kiujn niaj neinstruitaj antaŭuloj faris el blinda neceseco, — ni estus similaj je tiu naivulo, kiu, havante du bonajn okulojn, intence falis super ŝtono kaj vundis al si la kapon . . . ĉar li vidis, ke antaŭ li multaj blinduloj falis super tiu ĉi ŝtono, kaj li pensis, ke oni tiel necese devas fari!

Sekve se ni eĉ en nenia blinde kreita lingvo trovus la transportadon de l' akcento de unu silabo sur silabon alian pro konstanteco de l' akcento, tio ĉi neniel devus nin deteni de enkonduki tiun ĉi oportunajon en nia arta kaj konscie kreita lingvo, tiel same kiel la malregula konjugado en ĉiuj lingvoj ne sole ne devigas, sed ankaŭ tute ne pravigas nin enkonduki intence malregulan konjugadon en nia lingvo. Sed por forigi ĉiujn dubojn de la personoj, kiuj, ne konfidante al tio, kion la praktiko al ili montras, teorie timas, ke eble . . . eble . . . oni ne scias . . . oni ne vidis ekzemplojn k. t. p. — ni fine montrus ankoraŭ, ke la transportado de l' akcento de unu silabo sur alian ne estas eĉ ia ennovaĵo de nia flanko, sed ĝi ekzistas jam en la lingvoj naturaj, kvankam tiuj ĉi tute ne bezonis zorgi pri facileco. Apartajn ekzemplojn Vi trovos sur ĉiu paŝo en ĉiu lingvo; sed, por ne malproksime foriri de nia lando, ni bezonas nur kompari la lingvojn rusan kaj polan, kaj ni vidos, ke tute tio sama, kion ni faris en nia lingvo, estis jam antaŭe farita de la naturo mem en la natura lingvo pola. De neniu kaj de nenio devigata, la lingvo pola akceptis konstantan akcenton sur la antaŭlasta silabo, kvankam en aliaj slavaj lingvoj en tiuj ĉi vortoj la akcento estas alia; kaj tion ĉi la lingvo pola faris tute sen ia mallongigado de vortoj, sen ia forĵetado de silaboj k. t. p., sed ĝi simple senceremonie transportis la akcenton de unu silabo sur alian; sen ia filozofado ĝi metis la akcenton de ĉiu vorto sur la silabon antaŭlastan, tute ne demandante, ĉu tiu silabo estas tia aŭ alia kaj ĉu ĝi havas la forton por porti sur si la akcenton, kaj tute ne timante, ke oni diros, ke ĝi estas kontraŭnatura. Kaj tion ĉi la lingvo faris ne sole kun la fremdaj, arte enportitaj vortoj (kiel ekzemple „adwókat“, „inzýnier“, „telégraf“, „spirýtus“, „manúskript“, „pápiér“, „tytúlu“, „artykúlu“ k. t. p.), sed ankaŭ en ĉiuj senescepte vortoj pure slavaj (ekzemple la rusaj „málenki“, „vojná“, „oknó“, „ĉelovjék“, „úlica“ k. c. k. c. k. c. en la tuta lingvo — estas en la lingvo pola „malénki“, „wójna“, „ókno“, „człówiek“, „ulica“ k. c. k. c. k. c.) — jam ne apartaj disĵetitaj ekzemploj, sed miloj kaj dekoj da miloj — tuta lingvo! (Se en la tuta lingvo Vi en kelkaj tre malmultaj vortoj trovas deflankigon de tiu ĉi

regulo, Vi facile rimarkos, ke tiun ĉi deflankigon faris ne la popolo, sed la instruituloj, tute sen ia kaŭzo kaj bezono kaj kontraŭ la spirito de la lingvo).

Nun al la konkludo. Ke konstanta regulo por la akcento en lingvo lernota estas mil fojojn pli bona ol akcento neregula — neniu dubos; se ni povas ĝin fari, ni devas ĝin fari, se eĉ neniu el la blinde kreitaj lingvoj ĝin farus. Se ni al tio ĉi vidas, ke lingvo natura, kiu ja tute ne bezonis zorgi pri facileco, faris tion saman el simpla kaprico kaj tute ne suferas de tio, — tiom pli ni jam ne povas dubi, ke en lingvo arta, por kiu facileco estas tre grava, oni devis sen ia eĉ minuta ŝanceliĝo akcepti la akcenton konstantan, eĉ se la demando estus levita antaŭ la kreiĝo de la lingvo. Sed se nun, kiam la lingvo estas jam kreita kaj uzata, ni volus fari en ĝi grandan rompadon por sen ia kaŭzo kaj celo doni al ĝi maloportunaĵon anstataŭ oportunaĵo — tio ĉi estus jam facilanimeco nepardonebla!

El diversaj faritaj teoriaj proponoj ni analizis nur unu — la ŝajne plej bonan, kaj ni montris, ke tio, kio en la teorio ŝajnas tre bona kaj trovas aprobantojn, en la praktiko ofte havas nenian signifon. El la diritaĵo ni faras la konkludon: proponante aŭ enkondukante (private) ian ŝanĝon en nia lingvo, neniam gvidu Vin per konsideradoj teoriaj, kiel ajn belaj ili ŝajnas, sed ĉiam demandu Vin, kian praktikan signifon la ŝanĝo havus. Pri la ekzemplo de teoria propono ni tiel multe parolis, ĉar tiu ĉi kategorio da proponoj apartenas al la plej dangeŝajnaj: en tia afero, kiel la nia, homoj la plej volonte akceptas proponojn, kiuj havas fizionomion instruitan; kaj se oni parolas al la homoj en instruita formo kaj en la nomo de leĝoj sciencaj, tiam el 100 personoj 99 ĝin blinde aprobas kaj nur unu demandas sin: „tre bele, sed kian signifon ĝi havas por nia lingvo?“

(Daŭrigo venos.)

La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.

(Daŭrigo.)

„Kara Marion, ne legu pli hodiaŭ vespere“, diris Grace — ĉar ŝi ploris.

„Mi ne povas“, ŝi rediris kaj kovris la libron. „La literoj ĉiuj ŝajnas bruli!“

La doktoron tio ĉi amuzis; kaj li ridis, frapante al ŝi sur la vangoj.

„Kio! ĝis larmoj tuŝita de romano!“ diris doktoro Jeddler. „De presa nigraĵo kaj papero! Ne, ne, estas ĉio egale. Estas tiom same prudente preni serioze presan nigraĵon kaj paperon, kiel ĉian alian aferon. Sed sekigu viajn larmojn, sekigu viajn larmojn. Mi estas konvinkita, ke la heroino de longe estas jam returne en la patra domo kaj kun ĉiuj paciĝis, — kaj se ŝi tion ĉi ne faris, efektiva patrodomo konsistas ja propre nur el simplaj kvar muroj; kaj imagita — el paperajo kaj inko. Kio estas?“

„Ĝi estas mi, sinjoro“, diris Clemency enŝovante la kapon tra la pordo.

„Kio estas al Vi?“ demandis la doktoro.

„Ho, mia Dio, nenio al mi estas“, respondis Clemency — kaj ŝi estis prava, se oni povis juĝi laŭ ŝia bone sapita vizaĝo, el kiu kiel ordinare brilis la efektiva esenco de bona humoro, per kio ŝi, kiel ajn ne bela ŝi estis, efektive fariĝis simpatia. Kontuzitaj kubutoj ordinare ne estas kalkulataj al belajoj; sed en la irado tra la vivo estas ĉiam pli bone sur la malvasta vojo malbonigi al si la kubutojn anstataŭ la bona humoro, kaj tuŝante tion ĉi lastan Clemency estis tiel freŝa kaj sana, kiel ĉia belulino en la tuta lando.

„Ho, nenio al mi estas“, diris Clemency kaj tute eniris tra la pordo, „sed venu iom pli proksime, sinjoro!“

Iom mirigite la doktoro plenumis ŝian deziron.

„Vi diris, ke mi donu al Vi nenion, kiam ŝi apudestas, Vi scias,“ diris Clemency.

Iu fremda en la familio, laŭ ŝia stranga okulado ĉe tiuj ĉi vortoj kaj la aparta loga movo de ŝiaj kubutoj, kvazaŭ ŝi volus ĉirkaŭpreni sin mem, povus eble pensi, ke „nenion“ signifas, ĉe la plej favora klarigado, honestan kison. Efektive ŝajnis, ke la doktoro en la unua minuto mem ne sciis, kion li devas pensi; sed li baldaŭ retranskiviligis, kiam Clemency, traserĉinte en la ambaŭ poŝoj — ŝi komencis de la ĝusta poŝo, poste fosis en la malĝusta kaj fine revenis al la ĝusta — ellevis leteron.

„Britain preterveturis,“ ŝi diris, transdonante la leteron al la doktoro, „kiam la poŝto venis, kaj li atendis. En la angulo staras A. H. Mi vetas, ke sinjoro Alfred revenas. Ni havos feston de edziĝo en la domo — mi havis matene du kuleron en la poŝo... Ho, Dio, kiel malrapide li ĝin malfermas.“

Ŝi parolis ĉion tion ĉi kiel monologon, dum en ŝia senpacienca sciigi la novaĵon ŝi levis sin sur la finetojn de la piedoj kaj el ŝia antaŭtuko faris korktirilon kaj el ŝia buŝo botelon. Fine, perdinte la paciencon atendi, dum la doktoro kun la letero ĉiam ankoraŭ ne estis preta, ŝi subite returne mallevis sin sur la plandojn kaj ĵetis sian antaŭtukon kiel kovrilon trans la kapon, plena je muta malespero kaj ne povante plu ĝin elteni.

„Venu, knabinoj!“ ekkriis la doktoro. „Mi ne povas alie; en mia vivo mi nenian sekreton povis teni ĉe mi. Kaj ankaŭ ne estas multe da sekretoj, kiuj estus indaj esti tenataj en tia — sed ni silentu pri tiu ĉi. Alfred reveturas kaj baldaŭ venos!“

„Baldaŭ!“ ekkriis Marion.

„Kio! la romano estas tiel rapide forgesita!“ diris la doktoro kaj pinĉis al ŝi la vangon. „Mi tuj sciis, ke la sciigo sekigos la larmojn. Jes! „Mi volas fari al ŝi surprizon“, li tie ĉi skribas. Sed tio ĉi ne iros. Li devas havi konvenan akcepton.“

„Baldaŭ!“ ripetis Marion.

„Nu, eble ne tiel baldaŭ, kiel Via senpacienca pensas“, respondis la doktoro; „sed sufiĉe baldaŭ. Ni rigardu! hodiaŭ estas ĵaŭdo, ne vere? tiel li intencas veni de hodiaŭ post monato.“

„De hodiaŭ post unu monato“, mallaŭte ripetis Marion.

„Ĝoja tago kaj festo por ni ĉiuj“, diris per gaja voĉo ŝia fratino Grace, kiu gratulante ŝin kisis. „Longe atendita tago, mia kara, kiu fine venis.“

Rideto estis la respondo, malgaja rideto, sed plena je fratina amo; kaj kiam ŝi rigardis al ŝia fratino en la vizaĝon kaj aŭskultis la ĉarman harmonion de ŝia voĉo, kiam ŝi plu pentradis la ĝojojn de la revidiĝo, tiam sur ŝia propra vizaĝo brilis espero kaj ĝojo.

Kaj ankoraŭ io: io, kio pli kaj pli trarigardis tra la ceteraj sentoj, kaj por kio mi ne havas nomon. Tio ĉi ne estis ĝojo, triumfo, fiera entuziasmo — tiuj ĉi ne montras sin tiel trankvile. Tio ĉi estis ne sole amo kaj dankemo, kvankam tiuj ĉi faris parton de tio ĉi. Ĝi ne venis de ia egoista penso, ĉar tiuj ĉi ne brilas tiel sur la frunto, ne flamas tiel sur la lipoj.

Doktoro Jeddler malgraŭ ŝia filozofio — kiun li ĉiam en la praktiko forgesadis, kiel ĝi ofte okazas al gloraj filozofoj — ne povis sin deteni montri tian grandan intereson je la reveno de ŝia malnova lernanto kaj zorgato, kiel se ĝi estus ia serioza afero. Tiel li denove sidigis en sian avan seĝon, denove etendis la piedojn sur la varman tapiŝon, multfoje tralegis la leteron kaj ankoraŭ pli multe parolis pri ĝi.

„Ho, estis ankoraŭ tempo“, diris la doktoro kaj rigardis

en la fajron, „kiam Vi ambaŭ kune, vi, Grace, kaj li, kuradis brako en brako, kiel paro da vivaj pupoj. Ĉu vi memoras?“

„Ho jes,“ ŝi respondis kun gaja rido kaj daŭrigis kudri diligente.

„De hodiaŭ post unu monato!“ diris la doktoro meditante. „Ŝajnas kvazaŭ de tiu tempo pasis ne pli ol unu jaro. Kaj kie tiam estis mia malgranda Marion?“

„Neniam malproksime de sia fratino, kiel ajn malgranda ŝi estis,“ diris Marion: „Grace estis por mi ĉio, eĉ tiam, kiam ŝi ankoraŭ mem estis infano.“

„Tre vere, mia kateto, tre vere,“ respondis la doktoro. „Ŝi estis solida malgranda mastrino, mia Grace, kaj bona ekonomistino kaj diligenta saĝa infano: plena je pacienco por niaj kapricoj, ĉiam preta antaŭplenumi niajn dezirojn kaj forgesi la proprajn; eĉ jam tiam. Jam en tiu tempo, Grace, vi neniam estis kolera kaj disputema, esceptinte rilate unu punkton.“

„Mi timas, ke de tiu tempo mi tre ŝanĝiĝis al pli malbona,“ ridis Grace, ĉiam ankoraŭ diligente laborante. „Kia punkto ĝi estis, patro?“

„Alfred, kompreneble,“ diris la doktoro. „Vi estis nur tiam kontenta, se mi vin nomis la edzino de Alfred; tial ni vin nomis edzino de Alfred; kaj tio ĉi pli al vi plaĉis (kiel ajn strange ĝi nun ŝajnas), ol se ni donus al vi la titolon de dukino, se ni povus vin fari dukino.“

„Efektive tiel estis?“ trankvile diris Grace.

„Kiel, ĉu ĝin pli ne memoras?“ demandis la doktoro.

„Mi pensas, ke mi ĝin ankoraŭ iom memoras“, ŝi respondis, „sed nur apenaŭ. Estas tro longe de tiu tempo.“ Kaj kudrante ŝi kantetis la rekanton de unu malnova kanto, kiun la doktoro amis.

„Alfred baldaŭ havos efektivan edzinon,“ ŝi diris, dominante al la interparolo alian direkton; „kaj tio ĉi estis bela tempo por ni ĉiuj. Mia trijara ofico estos baldaŭ finita, Marion. Vi faris ĝin al mi tre facila. Mi diros al Alfred, kiam mi metos vin ree al lia brusto, ke vi lin la tutan tempon kore amis kaj ke li eĉ unu fojon ne bezonis mian subtenon. Ĉu mi povas ĝin al li diri, mia kara?“

„Diru al li, amata Grac“, respondis Marion, „ke neniam ŝuldo tiel noble, tiel grandanime, tiel elteneme estis plenumata; ke mi vin de tiu tempo kun ĉiu tago pli amis; kaj ke mi vin nun tiel senfine amas!“

„Tion ĉi mi ne povas al li diri,“ respondis ŝia fratino, ŝin ĉirkaŭprenante; „miajn meritojn la fantazio de Alfred al si pentru. Li sufiĉe trograndigos, kara Marion, tute kiel vi.“

Ŝi nun reprenis sian laboron, kiun ŝi estis formetinta el la mano, kiam ŝia fratino parolis kun tia tuŝiteco de l' koro, kaj ŝi denove kantetis la malnovan kanton, kiu tiel plaĉis al la doktoro. Kaj la doktoro, ĉiam ankoraŭ sidante en la apoga seĝo, aŭskultis la kanton, batis la takton al ĝi sur sia genuo per la letero de Alfred, rigardis siajn filinojn kaj diris al si, ke inter la multaj vanajoj de la vana mondo tiuj ĉi almenaŭ estas sufiĉe belaj.

Dume Clemency Newcome, plenuminte sian alporton de sciigo kaj atendinte en la ĉambro ĝis ŝi ĉion sciis, iris returne en la kuirejon, kie sinjoro Britain post la vespermanĝo faris al si oportune, ĉirkaŭite de tia grandanombra kolekto da brilantaj kovriloj de potoj, pure frotitaj patoj, poluritaj pladoj, brilantaj kaldronoj kaj aliaj signoj de ŝia diligento sur la muroj kaj sur la bretoj, ke li sidis kvazaŭ en la mezo de magazeno de speguloj. La plej granda parto el ili vere donis ne tre flatan repentron de li; ankaŭ iliaj prezentaĵoj estis tute ne egalaj; ĉar kelkaj donis al li tre longan vizaĝon, kelkaj tre larĝan, aliaj sufiĉe agrablan kaj aliaj tre malbelan, ĉiu laŭ sia maniero de reprezentado, tiel same, kiel faras la homoj. Sed en tiu ili ĉiuj konsentis, ke inter ili tute oportune sidas individuo, tenanta la pipon en la buŝo kaj

kruĉon da biero apud si kaj balancanta kun esprimo de grandanimeco la kapon al Clemency, kiam ŝi sidigis al tiu sama tablo.

„Nu, Clemency“, diris Britain, „kiel vi nun fartas? kaj kio da nova estas?“

Clemency diris al li, kion ŝi sciigis, kaj li akceptis tion ĉi tre afable. Bona ŝanĝiĝo estis videbla eĉ Benjamin de la kapo ĝis la piedoj. Li estis multe pli larĝa kaj pli ruĝa, pli gaja kaj pli gajiga. Ĝi elrigardis, kvazaŭ lia vizaĝo estis antaŭe kunligita en tuberon kaj nun estis disligita kaj elglatigita.

„Tio ĉi kredeble estos nova negoco por Snitchey kaj Craggs“, li diris, kun oportune blovante nubojn de fumo en la aeron.

„Kaj ni eble denove estos atestantoj, Clemency!“

„Dio!“ respondis Clemency kun la kutima movo de siaj amataj membroj: „Mi volus ke mi ĝi estu, Britain!“

„Kio?“

„Ke mi estu la persono, kiu devas edziniĝi!“

Benjamin prenis la pipon el la buŝo kaj kore ridis. „Jes, vi estas tute la ĝusta por tio ĉi,“ li diris; „malfeliĉa Clemency!“ Clemency de sia flanko ridis tiel same kore kiel li, kaj ŝajnis ke la penson ŝi trovas tiel same amuza, kiel li. „Jes,“ ŝi konsentis, „mi estas tute la ĝusta por tio ĉi, ne vere?“

„Vi neniam edziniĝos, kompreneble,“ diris sinjoro Britain kaj prenis la pipon returne en la buŝon.

„Vi efektive pensas, ke ne?“ diris Clemency tute senkulpe.

Sinjoro Britain balancis la kapon. „Nenia espero por tio ĉi!“

„Pripensu nur!“ diris Clemency. „Mi pensas, ke vi ĝin baldaŭ faros, Britain; ne vere?“

Tiel subite metita demando pri tia grava afero postulis pripenson. Li elblovis grandan nubon da fumo kaj, metante la kapon jen dekstren jen maldekstren, li ĝin ĉirkaŭrigardadis, kiel se tiu ĉi nubo estus la demando kaj li ĝin rigardus de diversaj punktoj de vidado, kaj li respondis, ke li la aferon ankoraŭ ne bone klarigis al si, sed — jes, jes, li eble ankoraŭ decidigos tion ĉi fari.

„Kiu ajn ŝi estos, mi deziras al ŝi feliĉon!“ ekkriis Clemency.

„Ho, tio ĉi al ŝi ne mankos“, diris Benjamin, „certe ne.“

„Sed ŝi ne vivus tiel feliĉe kaj ne havus tiel tute bonan kaj amindan edzon“, diris Clemency, duone metinte sin super la tablon kaj medite rigardante la kandelon, „se mi antaŭe ne estus — ne ĉar mi intencis, ĉar ĝi estis pura kuntrafiĝo: ne vere, Britain?“

(Daŭrigo venos.)

Korespondoj.

Praha-Smichov (Bohemujo)
Rezl. 265 dvere 20, la 29. VI. 91.

Estimata sinjoro!

Mi estis tre longan tempon malsanega, tial mi ne povis eĉ skribeti al Vi. Nun mi ne loĝas en Zbislav, sed en Praha (Prag). Mi vastigadas la lingvon internacian inter laboristoj kaj havos paroladojn en ĉi tieaj kluboj pri ĝi, — poste mi pli multe skribos al Vi.

Kun korega saluta Via

Fr. VI. Lorenc.

En la urbo Freiburg en Baden fondiĝis Klubo Esperantista. La klubestro estas sinjoro d—ro Haas. Vivu, floru kaj kresku la nova klubo!

„ESPERO“
Societo Esperantista
en
S. Peterburgo.

S. Peterburgo, 1^a Junio 1891.

Plej estimata Sinjoro!

Per tio ĉi ni havas la honoron Vin sciigi, ke hodiaŭ ni subskribitaj fondis rondeton esperantistan sub la nomo

„Espero“

Societo Esperantista en S. Peterburgo.

Ni penos senĉese varbi novajn adeptojn kaj amikojn de la lingvo „Esperanto“; kolekti por la celoj de nia afero; eldoni, se eble, gazetojn, originalajn verkojn, tradukojn el aliaj lingvoj, gramatikojn kaj vortarojn; publikigi artikolojn pri nia lingvo en alilingvaj gazetoj; korespondadi kun Esperantistoj kaj aliaj personoj en „Esperanto“; aranĝi publikajn paroladojn; instrui senpage novajn adeptojn; per anoncoj kaj plakatoj meti atenton de la amasoj je nian lingvon; entute kun fortoj unuigatoj fari ĉion, kio dependas de ni, por ke nia lingvo atingu sian grandan celon al la beno de l'homaro.

Vin petante komuniki tien ĉi al la legantoj de Via gazeto, ni permesas al ni aldoni kelkajn vortojn.

Fratoj-Esperantistoj en la tuta mondo! Ni unuigos kun Vi por bataladi senlace por nia sankta afero kontraŭ la indiferenteco kaj maldiligenteco de la amasoj.

Ju pli malfacila la batalado, des pli glora kaj brila la venko!

Nia vojo kondukas tra la ruinoj de la multlingva estinteco. Ĉu Vi aŭdas la bruadon en la aero? Hoj ho! tio estas la flugilbatoj de la estonteco. Ni aŭdas la bruadon, kaj niaj koroj ekbatas pli ĝoje, ĉar al ni estas la venontaj centjaroj.

Antaŭen, fratoj, kurage antaŭen!

Konstante grandigante, kiel lavango, nia afero rulos senhalte antaŭen, ĝis ĝi atingos en sia tuta beleco sian grandan celon.

Kaj en tiu ĉi „Espero“ ni komencas la propagandon por nia amata, bela lingvo „Esperanto“.

Donu al ni Vian helpan manon, kaj kun fortoj unuigitaj ni almitos la mondon!

Kun alta estimo
Via humila
Arthur Florell,
societestro.

Adreso por leteroj: A. Florell, Str. Nikolaevskaja, D. 43, L. 15 S. Peterburgo.

La unuaj membroj de la societo „Espero“: Arthur Florell (ĉe Blickhan k. Robinson), Nicolai Halle (ĉe Blickhan k. Robinson), V. Terentjeff (ĉe Blickhan k. Robinson), Friedr. Martinoffsky (ĉe Gefratoj Nobel), Emil Martinoffsky (ĉe J. W. Junker k. K.), Alexander Collins (ĉe J. W. Junker k. K.), Eduard Hall (ĉe F. Schwankowski), Max Weber (ĉe Boreische k. Maximowicz), Ludwig Borgmann (ĉe Franz Diehl), Georg Collins (Gr. Konjuŝennaja str. No. 10), Wold. (Kenneweg Pekí, 8^a strato, d. No. 18).

De sinjoro Voldemar Ŝmurlo ni ricevis el Riga leteron, en kiu li proponas, ke ni en la titola paĝo de nia gazeto presu en diversaj lingvoj ĝian esencon kaj celon, tiel ke ĉiu ne konanta nian lingvon, vidinte ie numeron de nia gazeto, sciigu tuj pri nia afero. Eble poste ni sekvos tiun ĉi konsilon. Li konsilas ankaŭ zorgi, ke la libroj pri nia lingvo estu vendataj sur la stacioj de fervojoj, kie la enuantaj vojaĝantoj ilin volonte aĉetados, kaj ke numeroj de nia gazeto sin trovu en la ĉambroj de atendado de kuracistoj, advokatoj, notarioj k. t. p.; ke oni uzadu nian lingvon por gratulaj telegramoj al amikoj kaj konatoj en gravaj aktoj de ilia vivo,

ĉar tiaj telegramoj faras impreson sur la amason. Ne povante mem plenumi la proponojn, ni laŭ la deziro de nia estimata korespondanto presas la proponojn en nia gazeto. Sinjoro Ŝ. deziras korespondi pri tio ĉi kun aliaj amikoj; lia adreso estas: urbo Ĉelaba, gub. Orenburg. — Li ankaŭ skribas al ni, ke sinjoro Paul Wiskowatoff, profesoro de la universitato en Dorpat, ellernis la lingvon Esperanto kaj varmege defendas la ideon de la lingvo internacia.

Avizo.

Mi sciigas ĉiujn amikojn de nia afero, ke la ĝisnuna dua klubestro de la „Internacia Klubo de Korespondado, sinjoro Hans Schmidt, Nurnberg“, Albrecht Durerstrato 4, nek pli estas membro de la dirita nek de la Klubo Esperantista en Nurnberg“.

Chr. Schmidt,
kondukanto de la Esperantistoj en Nurnberg“.

La Preĝo.

El Lamennais.

Kiam vi preĝis, ĉu vi ne sentas vian koron malsargita kaj vian animon pli kontenta?

La preĝo faras la malĝojon malpli dolora kaj la ĝojon pli pura: ĝi miksas al la unua mi ne scias kion fortigantan kaj dolĉan, kaj al la dua ian bonodoron ĉielan.

Kion vi faras sur la tero, kaj ĉu vi havas nenion por peti al Tiu, kiu vin metis sur ĝin?

Vi estas vojaĝanto, kiu serĉas sian patrujon. Ne marŝu kun kapo mallevita: oni bezonas la okulojn por eltrovi sian vojon.

Dia patrujo estas la ĉielo, kaj kiam vi rigardas al la ĉielo, ĉu nenio sin movas en vi? ĉu nenia deziro vin premas? aŭ ĉu estas muta tiu ĉi deziro?

Estas renkontataj personoj, kiuj diras: „Por kio servas preĝi? Dio estas tro alte super ni por aŭskulti krejtojn tiel mizerajn!“

Sed kiu do faris tiujn mizerajn krejtojn? Kiu donis al ili la sentadon, la pensadon kaj la parolon, se ne Dio?

Kaj se Li estas tiel bona al ili, ĉu ĝi estis por ilin poste forlasi kaj forĵeti malproksimen de Li?

Certe mi diras al vi: kiu pensas en sia koro, ke Dio malestimas siajn faritaĵojn, tiu blasfemas Dion.

Estas aliaj, kiuj diras: „Por kio servas preĝi Dion? Ĉu Dio ne scias pli bone ol ni, kion ni bezonas?“

Pli bone ol vi Dio scias, kion vi bezonas, kaj tial volas, ke vi ĝin petu de Li; ĉar Dio estas mem via unua bezono, kaj preĝi Dion estas komenci posedi Dion.

La patro ja konas la bezonojn de sia filo: ĉu pro tio estas dece, ke la filo neniam havu unu parolon de peto kaj de danko por sia patro?

Kiam la bestoj suferas, kiam ili timas aŭ havas malsaton, ili plende kriadas. Tiuj kriadoj estas la preĝo, kiun ili prezentas al Dio, kaj Dio ĝin aŭskultas. Ĉu do en la mondo la homo estus la sola estaĵo, kies voko ne atingas la oreilon de l' Kreinto?

Tradukis L. de B.

Karagara.

Hinda fabelo.
Rakontis F. V. L.

En la urbo Vataman vivis saĝa, sed malriĉa bramano Kevava. Lia edzino Karagara estis malbona al ĉiu; eĉ la

diablo, kiu loĝis en arbo apud tiu domo, el timo je Karagara forkuris en dezerton. La bramano ne povis elporti la turmentojn ricevatajn de sia edzino, kaj foriris. En la vojo vidis lin la diablo kaj diris: „Hodiaŭ mi regalos vin. Ne timu! Mi loĝis en arbo apud via domo, sed el timo je Karagara mi forkuris; mi volas fari al vi ion bonan. Iru en la urbon Mrigavati; tie regas Madana; mi eniros en lian filinon Mri-galoĉana'n kaj lasos min elirigi nur per vi“.

Tiel estis farita. La diablo eniris en la princinon, la bramano venis kaj faris ĉion, kion faras la aliaj magiistoj, sed la diablo ne eliris. Fine la bramano diris: „En la nomo de Karagara, eliru!“ kaj la diablo obeis.

La reĝo donis al la bramano sian filinon kiel edzino kaj kun tio ĉi ankaŭ duonon de la regno. — La diablo iris en la urbon Karnavati kaj eniris en la reĝinon Suloĉana'n. La reĝo sendis al Madana kaj petis pri la magiisto Kecava. Tiu ĉi venis al la turmentata reĝino, sed la diablo, vidinte lin, diris: „Jam unu fojon mi helpis al vi; nun gardu vin.“ La bramano alpaŝis pli proksime kaj ekmurmuretis al la reĝino en la orelon: „Karagara venis; mi volis nur diri ĝin al vi“. La diablo, aŭdinte tion ĉi, ektimis kaj eliris. La bramano, ricevinte grandajn honorojn de la reĝo, reiris en la urbon Mrigavati.

Sentencoj kaj paradoksoj.

de L. Meier.

1. Ĉampano estas plej malsana, kiam oni ĝin ne havas.
2. Laŭ la soifo konatiĝas karaktero.
3. Gloraj homoj havas la strangan sorton, ke ili fariĝas senmortaj ne pli frue ol kiam ili mortis.
4. Cicero eble ne fariĝus tiel glora parolisto, se li estus naskita mutulo.
5. Kion ni perdis je mono, tion ni gajnas je sperto.
6. „La plej feliĉa geedzo estis Adam kaj Eva, ĉar ili ne havis bopatrinojn“. Neniel! — estis serpento en la Paradizo.
7. La mondo estas rondo — tamen oni alpuŝiĝas je multaj anguloj.
8. Bona parolemeco en ia societisto estas tio, kio sukero estas en kafo.
9. Homoj plej muzikaj ofte ne scias, kio estas „bona tono“.
10. Malriĉaj homoj malofte estas avaraj.
11. Bonfaremeco devas esti juĝata kiel virinoj: plej bona estas tiu, pri kiu oni plej malmulte parolas.
12. Dankemeco estas fondita sur humilemeco.
13. Kelkaj tiel saĝege demandas, ke nur frezulo povas doni respondon.
14. Eble nenio estas tiel kruela, kiel la naiveco de infano.
15. Promenadi kun saĝeco ankaŭ estas arto.
16. Ankaŭ lerni devas esti lernata.
17. Flataĵo ĉiam estas resalta.
18. Premo de l' mano estas gesto plej parolanta.
19. Estas homoj, kiuj mensogas nur per la okuloj — tiuj homoj estas la plej timindaj.
20. Ĉiu penso jam estis unu fojon pensita; sed la eltrovanto ĝin je l' unua fojo elparolis.
21. „Mi pensis“ — ordinare diras nepensemuloj.
22. Morti ofte kostas pli multe, ol kostis la tuta vivado.
23. Fino ne ĉiam estas lasta.
24. Kelkaj homoj ne pli frue estas sobraj, ol kiam ili malsobriĝis.

25. Honesteco estas monero — ĝi brilas nur kiam ĝi estas nova.

26. Nenio estas pli trompa ol vizaĝo honesta.

27. Estas ankaŭ ia kuraĝo, kiu naskiĝis el malkuraĝeco.

28. Libereco ofte estas nenio alia ol plej serioza sklaveco.

Novajoj.

Por la celoj de nia afero ni ricevis de sinjoro J. Puĉkovski el Kjahta 2 rublojn.

* * *

Lernolibrojn (ne malpli ol 10) en la lasta monato venigis: s-ro V. Karelin el Kargino (gub. Enisejsk) — 10/41; F. Martinovski el S. Peterburgo — 25/41.

* * *

En la lasta monato la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Svjet“ No? (anonco de s-ro Hübert pri nia afero); „Novoje Vremja“ No 5485 (pri la traduko de la „Renaskita Manfred“); „Bayerischer Kurier“ No 135 (pri la gramatiko de s-ro L. Meier); „Lokal-Anzeiger der Münchener Neuesten Nachrichten“ No 189 (anonco pri la senpaga instruado de nia lingvo en la societo „Merkur“ en Munĥeno). Al sinjoroj Maynov kaj Meier, kiuj sendis al ni la diritajn gazetojn, ni esprimas nian koran dankon.

Aldono al la Fingra Kalendaro.

(v. „La Esperantisto“ 1891 No. 1.)

Rimarko 1^a Rilate la lastan regulon por difini la tagon en malproksima jaro (ĉe kiu ni diris, ke ni devas dividi je sep la nombron de la superfluaĵ tagoj, kiuj sin trovas en la intertempo inter la kuranta jaro kaj la serĉata) ni devas fari la rimarkon, ke se ni troviĝas en la lastaj dek monatoj de superjaro, ni devas, ĉe la elkalulado de la superfluaĵ tagoj, aldoni ankoraŭ unu tagon por la 29^a Februaro de la kuranta jaro. Tiel same oni devas agi, se la serĉata dato troviĝas en Januaro aŭ Februaro de ia superjaro.

Rimarko 2^a Serĉante ian daton en pasintaj centjaroj, ni devas meti atenton sur la lastan jaron de la centjaro, kiu, malgraŭ ke la nombro de la jaro estas dividebla je 4, nur tiam estas superjaro, kiam la nombro de la centjaro dividas sin je 4. Sekve la jarojn 1700, 1800 kaj 1900 ni devas kalkuli al la jaroj simplaj kaj ne al superjaroj, ĉar la nombro 17, 18 kaj 19 ne estas divideblaj je 4.

Ĉiuj reguloj de nia fingra kalendaro povas esti uzataj tiel same por la Julia kalendaro (malnova stilo), nur kun tiu diferenco, ke la punkto de dimanĉo falas ĉiam sur la duan sekvantan punkton post tiu, kiu en la kalendaro Gregoria (nova stilo) signifas la dimanĉon; se tiel laŭ la kalendaro Gregoria D signifas la dimanĉon por la kuranta jaro 1891, la dimanĉo laŭ la malnova stilo estos sur la punkto F. Sed ni devas sciigi niajn karajn legantojn, ke la lasta rimarko (pri la lastaj jaroj de centjaroj) tie ĉi ne povas havi lokon.

Nun, estimataj amikoj de nia lingvo, se Vi komprenas ĉiujn regulojn de nia kalendaro, tiam ne estos al Vi malfacile solvi la sekvantajn du temojn:

1^a. Difinu la tagon de la morto de Koperniko, kiu mortis la 12^{an} de Februaro de l'jaro 1473.

2^a. Trovu, en kiu tago naskiĝis Kristo?

Rimarko. Ĉe la ambaŭ temoj devas esti uzata la kalendaro Julia, ĉar la Gregoria komencigis de la jaro 1583.

J. Grohn.

Anoncoj.

Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,
kiuj eliris ĝis Julio 1891.

- | № | Nomo de l' verko: | Kosto: |
|-----|---|------------|
| 1. | D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predislovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa) | 15 kopekoj |
| 2. | — Język Miedzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola) | 15 kop. |
| 3. | — Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca) | 20 kop. |
| 4. | — Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana) | 20 kop. |
| 5. | R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla) | 20 kop. |
| 6. | D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj | 3 kop. |
| 7. | — por Poloj | 3 kop. |
| 8. | — por Francoj | 3 kop. |
| 9. | — por Germanoj | 3 kop. |
| 10. | — por Angloj | 3 kop. |
| 11. | D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto) | 25 kop. |
| 12. | D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto) | 10 kop. |
| 13. | Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea) | 20 kop. |
| 14. | A. Grabowski. La Nega Blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto) | 15 kop. |
| 15. | L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto | 50 kop. |
| 16. | N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“ | 25 kop. |
| 17. | D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia | 1 rublo. |
| 18. | N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua Libro“ | 10 kop. |
| 19. | A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto) | 15 kop. |
| 20. | L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia | 25 kop. |
| 21. | D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana | 25 kop. |
| 22. | Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator | 50 kop. |
| 23. | Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana | 20 kop. |
| 24. | G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda) | 20 kop. |
| 25. | A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget | 25 kop. |
| 26. | E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana | 3 kop. |
| 27. | G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda | 3 kop. |

- | | | |
|-----|--|---------|
| 28. | Klubo Nurnberga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein | 25 kop. |
| 29. | R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch) | 60 kop. |
| 30. | E. de Wahl. Princino Mary. Rakonto de Lernonto (en Esperanto). Kajero No. 1 | 25 kop. |
| 31. | Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1 | 10 kop. |
| 32. | Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana | 3 kop. |
| 33. | Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana) | 25 kop. |
| 34. | M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara) | 50 kop. |
| 35. | Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala) | 25 kop. |
| 36. | J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana) | 20 kop. |
| 37. | A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto) | 30 kop. |
| 38. | A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita) | |
| 39. | Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinarodni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema) | 25 kop. |
| 40. | D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta) | 20 kop. |
| 41. | L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj) | 10 kop. |
| 42. | Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Teil. Meza vortaro germana-internacia | 25 kop. |
| 43. | Die Weltsprache Esperanto. Vollständiges Lehrbuch nebst 2 Wörterbüchern (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Germanoj) | 10 kop. |
| 44. | A. Grabowski. La Nova Jaro, de Boleslaw Prus. Janko Muzikanto, de H. Sienkiewicz | 20 kop. |
| 45. | Ludwig Meier. La Lingvo Internacia Esperanto. Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto | 60 kop. |
| 46. | V. V. de Majnov. Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj, de K. R. | 25 kop. |
| 47. | A. Dombrovski. Lingvo internacia de Dro Esperanto, eldono litova. Mokintuve terptautiszkos kalbos Dro Esperanto | 15 kop. |

Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache.

Deutsch-international.

Meza vortaro germana internacia povas esti ricevata de la presejo de **W. Tümmel, Nürnberg.**

... Kosto 50 pfenigoj. ...